

KONTAKTO

numero 143 (1994:5)

SAL ARMEO

INTERVJUO
KUN NI AMBAŬ!

- Zoologiaj ĝardenoj por nia epoko
- Eldorado, la fabela orlando
- Malfacilas esti vegetarano en Rusio
- Ĉu fakso utilos?
- Lidja, filino de Esperanto

Kial zoologiaj ĝardenoj?	Remigiusz Mielcarek, Kanado	2
Malfacilas esti vegetarano en Rusio	Irina Alekseeva, Rusio	3
Ŝako al armeo	Felip Artero i Lozano k Hèctor Alòs i Font, Katalunio	4
Martin kaj... la papago!	Intervjuo kun Martin Burkert	8
Krucvorto (konkurso)	Klaus Dahmann, Germanio	9
Tatara tendo	trad. Sabira Ståhlberg, Germanio	10
La fabela lando el oro, Eldorado	Atiljo Orellana Rojas, Argentino	10
Ĉu fakso utilos?	Claude Piron, Svisio	12
Buŝa sekso	Georgo Kamaĉo, Hispanio	14
Duan fojon	trad. Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo	14
La bona into		15
Lidja	Heinz Dieter Maas, Germanio	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 143 (1994:5), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
☎ fakso +31 10 436 17 51
e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Alekseeva (Rusio)
Felip Artero i Lozano (Katalunio)
Martin Burkert (Germanio)
Zoran Ćirić (Serbio)
Alberto García Fumero (Kubo)
Bernard Golden (Hungario)
Georgo Kamaĉo (Hispanio)
Ludmila kaj Piotr Maliccy (Pollando)
Remigiusz Mielcarek (Kanado)
Atiljo Orellana Rojas (Argentino)
Oŝhó-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)
Claude Piron (Svislando)
Anna Rachón (Pollando)
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)
Jozef Truong (Usono)
Ilkka Santtila (Finnlando)
Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provlegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Faciltingvaj artikoloj estas verkigitaj en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifoj:

Tutpaĝa 675 gld., duonpaĝa 375 gld., kvaronpaĝa 205 gld., sesonpaĝa 155 gld., okonpaĝa 110 gld. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifoj varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



enkonduko

Jen temo, kiun delonge mi preparolas kun Felip kaj Hekĉjo: rifuzo al militservo. Se vin interesas scii, ankaŭ mi malamas tiun absurdan tempoperdon. Bonŝance mi ne devis militservi, ne ĉar mi naskiĝis en la nacia tago de mia lando (mi ja naskiĝis tiam kaj en pasintaj tempoj tiuj bonŝanculoj ne militservis), sed ĉar mi estis sub la lotumita numero, ekde kiu oni prenis soldatojn. Feliĉe de unu jaro ne plu ekzistas deviga militservo en Argentino, sed atingi tion kostis la vivon al unu soldato.

La gotikulo, kiu ilustras la ĉefartikolon, estas mia amiko Cabrilo, kiu fuĝinte el Iberio pro rifuzo militservi, nun meminciate volontulas kaj luktas por sia libereco ie en Britio. Dankon al li, kiu afable permesis uzi liajn/miajn (mi ja fotis lin!) fotojn.

Pli gaja iberia novaĵo: Georgo partoprenis (seksan) filmon! Jes, legu lian Ami kinon! Gratulon, Georgo!

La enigmo Bellertaj Konkursoj furoris (vd p. 14). He, Anna, multaj aldonis, ke ili tre ĝuis solvi ĝin. Anna respondas, ke ŝi jam pretigis plian.

Bonvenon en nian stabon al Atiljo (nun ie en Afriko), kiu "ore" debutas ĉi-numere.

Ĝis la venonta!

Francjo

Kial zooj?

Remigiusz Mielcarek, Kanado

Ni staras antaŭ malgranda kaĝo en zoo. Ene tigro aŭ leono aŭ ia simio. Ni prezentas al la publiko, kiel aspektas la besto, sed kian ideon ni transdonas al la vizitantoj? Bedaŭrinde en tia ĉi zoologia ĝardeno ni kaŭzas nur negativajn efikojn kaj nenion instruas krom montri la aspekton de la besto. Tion povas fari ankaŭ la natursciencaj muzeoj per mortaj specimenoj.

En la kaĝoj de zooj bestoj ofte malsanas pro manko de adekvataj kondiĉoj. Certe antaŭ 100 jaroj, kiam ni ankoraŭ malmulte sciis pri ekologio, do pri la rilatoj inter la organismoj kaj la medio en kiu ili vivas, tia ĉi ekspozicio povus esti komprenebla.

Lastatempe nova ideo de zoologia ĝardeno aperis en la mondo. Jen, certe la plej bona en la mondo, la zoologia ĝardeno de San-Diego (Usono), komencis novan eraon. Oni postulas, ke ne plu oni mezuru la kvaliton de zoologia ĝardeno per la nombro de tenataj specioj. Laŭ tiu ĉi kriterio la okcident-berlina zoo, posedanta 2 200 speciojn, estis la plej bona. Fakte mi ĝin vizitis. Certe laŭ la klasika normo ĝi estas bona, eĉ tre bona. Sed ne laŭ la nova, moderna koncepto de zoologia ĝardeno.

Post longaj studoj en Afriko, la sciencistoj de la san-diego zoo preparis grandan areon por goriloj, rekonstruante eĉ en etaj detaloj ilian naturan medion. La bestoj, ekzemple, havas la eblecon bone kaŝi sin de la publiko, kio permesas konservi ilian psikan sanon. Oni aldonis ne nur samajn speciojn de plantoj sed ankaŭ aliajn bestojn, kiuj ordinare vivas en la medio de goriloj. Sed ne nur goriloj bonŝancis, kun aliaj bestoj oni faris la samon.

La nuntempa ideo pri zooj estas prezenti ne plej multe da bestoj sed kvaliton en la prezentado. La rekonstruo de la natura mikromedio multe plilongigas la vivon de la bestoj en zoo kaj favoras ilian reproduktadon. Al la publiko ĝi vere donas la eblecon ekkoni ion pli pri la bestoj kaj imagi la ekologian interrilaton. Oni ne povas tiun ĉi celon akiri en simpla, tradicia kaĝa zoo. La ideo de San Diego longe superis eĉ tiun de la tiel nomataj "modernaj" zoologiaj ĝardenoj en kiuj oni anstataŭigis kaĝojn per grandaj terenoj ĉirkaŭigitaj de kanalo. Bedaŭrinde la medio montrata de tiuj ĉi terenoj estas tre ofte



Ĝis antaŭ nelonge zoologiaj bestoj devis ne nur montri sin, sed ankaŭ distri la publikon, ekzemple portante infanojn. Ofte ili estis mistraktataj kaj, kaze de "malbona karaktero", kruele mortigitaj.

tro artefarita. Kelkfoje oni metas nur ŝtonojn sen iuj ajn plantoj. Aliffoje oni metas la bestojn en ne adekvatan medion, ekzemple antarktajn birdojn en terenon plenan de arbustoj, kio estas, kompreneble, absurda.

Nuntempe la rolo de zoologia ĝardeno estas ne nur simple amuzi. Por la publiko zoo devas esti lernejo celanta al natuprotektado. Por la sciencistoj ĝi devas esti granda observejo. Finfine la ĉefa rolo estas protektadi la minacatajn speciojn. Rekreante por la bestoj bonajn kondiĉojn oni klopodas konservi ilin kaj plivastigi ilian nombron. Bedaŭrinde por multaj endanĝerigitaj specioj zoo estas la lasta rimedo de pluvivo. Ju pli bonajn zoologiajn ĝardenojn ni havas, des pli grandaj estas la ŝancoj, ke post kelkaj jaroj ni ne devos rigardi rarajn bestojn nur sur bildoj. □



Malfacilas esti vegetarano en Rusio

tre
facila

ĉu ne?

Le mi legis, ke ĉirkaŭ 5 el 100 angloj estas vegetaranoj*. Tre interesus min scii, kiom da vegetaranoj estas ĉe ni.

Antaŭ 3 jaroj mi decidis ne plu manĝi viandon kaj viandohavajn manĝaĵojn. Ekzistis kelkaj kialoj por mia vegetaranejo. Plej gravis, laŭ mi, esti sana. Due, mi forte kontraŭas la mortigadon de bestoj.

Mia vegetaranejo fariĝis granda surprizo* por miaj gepatroj. Ili diris, ke mi tuj mortos, se mi ne manĝos *almenaŭ** unu peceton da viando... Tiu ĉi estis nur la unua malhelpo, ĉar mi ja renkontis plurajn aliajn poste. Ekzemple, ke estas tro malmulte da informoj pri vegetaraj manĝaĵoj kaj ĝenerala malkomprenemo ĉe la proksimuloj.

Vere, multaj homoj (preskaŭ ĉiuj) ĉirkaŭ mi opinias, ke vivo sen viando estas neinda vivo.

Mi aŭdis ankaŭ, ke vegetaranoj estas fanatikuloj* kaj malsaĝuloj*. Kaj ofta preteksto* tie ĉi estas: "Jes, mi ja

fariĝus vegetarano, sed en nia lando tio estas malfacila, ĉar por satigi* sin oni simple devas manĝi, kion oni povas aĉeti." Tio estas vera malvero! La plej pura vero estas, ke la homoj timas bildigi al si vivon sen kolbaso*, viando, kokidaĵo*.

Mi tre esperas, ke venos tagoj, kiuj donos al Rusio pli da vegetaranoj, ĉar la homoj devas ekkompreni la bezonon de pli sana vivo.

... Dume, mi estas la sola vegetarano en mia familio.

Irina Alekseeva, Rusio



Francjo 1994

- almenaŭ:** plej malmulte
- kolbaso:** long-forma manĝaĵo el viando-pecetoj
- kokidaĵo:** manĝaĵo el ido de koko (= birdo, kiu diras "kokeriko!")
- preteksto:** ŝajna kialo, kiun oni diras por kaŝi la veran
- sati:** esti kontenta pri tio, kion oni manĝis
- saĝa:** kapabla bone pensi, agi
- fanatikulo:** sen-pensa sekvanto de io
- surprizo:** io, kio mirigas per sia neatenditeco
- vegetarano:** tiu, kiu ne manĝas viandon

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 paĝoj, tole bindita, ilustrita.
Prezo: 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



En 1979, la unua jaro de la demokratia konstitucio en Hispanio, 550 junuloj sin deklaris konscienc-rifuzantoj; en 1991 ili jam estis 28 051; kaj en 1993, 68 209, kio reprezentas trionon de la jara kontingento. Tiu ĉi movado ne same fortas tra la tuta ŝtato: en Eŭskio pli ol duono de la viraj junuloj rifuzas militservi; katalunoj ne multe postrestas eŭskojn kaj, laŭ nia scio, nur unu kataluna membro de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) militservis. La ministerio de defendo siatempe antaŭvidis po 30 000 rifuzantojn jare, kio jam estas komplete superita. Krome, la kreskoj de po 50% jare de la nombro de rifuzantoj en la lastaj tri jaroj, dum aldone ne kreskas la entuta kvanto da junuloj pro demografia stagnado, minacas la tutan armean strukturon pro malpleniĝo de la kazernoj.

Juna vira posedanto de hispana pasporto nuntempe devas alfronti devigan 9-monatan militservon. Se li ne volas, ekzistas por li du ĉefaj eblecoj, unu leĝa kaj la alia malleĝa. La unua estas fariĝi konscienc-rifuzanto kaj plenumi socian servon (praktike senpage kaj eble for de la hejmo) dum 13 monatoj, dum la dua, malleĝa, estas malobei kaj al militservo kaj al sociservo. Jam 7 000 junuloj fariĝis malobeantoj, kvankam ili riskas pli ol du-jaran prizonpunon. Ambaŭ elektoj ĝuas larĝan socian konsenton: asocioj, episkopoj, sindikatoj, partioj, urbestroj subtenas la enpaŝintojn.

Pro tiuj ĉi premoj la registaro devis plurfoje reagi: en la lastaj 15 jaroj la daŭro de la militservo mallongiĝis trifoje, kaj ĵus anonciĝis nova reglamento, kiu permesos al la soldatoj servi proksime de sia hejmo (malkiel nuntempe, kiam ili ofte estas senditaj en aliajn regionojn), ke ili dormu ĉe si, kaj enkondukas 8-horan labortagon por ili. Malgraŭ tio, ĉi-jare la kresko en la nombro de la rifuzantoj neniel malaltiĝas.

La kaŭzoj de rifuzo de militservado estas multnombraj: religiaj, politikaj, praktikaj. Nuntempe la kolapso de la deviga anstataŭa civilservo pro la grandega nombro de aliĝoj igas, ke multaj konscienc-rifuzantoj deĵoras unu-du tagojn semajne en oficejo, laboretas hejme aŭ sukcesas fari neniun servon.

La solvoj, kiujn oni proponas, same buntas. Unuj pledas por homigo de la militservo; aliaj deziras ekskluzive profesion militistaron, sen konskripcio; triaj revas pri nuligo de la armeo.

Per serio de ses intervjuoj ni esperas, ke vi pli profunde konatiĝos kun tiu ĉi impresa, varia kaj neperforta movado.

Neperforta vojo kontraŭ armeo


Nomo: Xavier Rodon i Morera
Okupo: Studis muzikon. Librobindingisto.
Neoficialaj okupoj: Kun sia kunulino, li organizas ĉiujn aranĝojn de KEJ.
Antecedentoj: Xavier apartenas al la unua generacio de la kontraŭ-milita movado, kies historion li ne hontas rakonti.

Vi vivis dum multaj jaroj en duone eksterleĝa, tute necerta situacio. Ĉu vi ion timis?

La jaron 1979-80, kiam mi rifuzis militservi, leĝis nur la Reĝa Dekreto de la jaro 1976, kiu

En 1936, generalo Millán Astray jene pafis dum la malfermo de la kurso en la Universitato de Salamanko: "Vivu la morto! Mortu la inteligento!". Armeo kaj polico montriĝis ĉiam inter la plej reakciaj potencoj en la hispana ŝtato, tiel ke ĝeneraliĝis malfido kontraŭ ili. Hispaniaj junuloj ekorganizis kontraŭ deviga rekrutado


fine de la 1970-aj jaroj, post la morto de la faŝisma generalo, kiu diktatore opresis la landon dum 40 jaroj. De tiam, tiu agado fariĝis la plej amasa junulara movado kaj nun ĝi serioze minacas kolapsigi la strukturon de la hispana armeo.



Felip Artero i Lozano kaj Hèctor Alòs i Font, Katalunio

akceptis ekskluzive religi-argumentan rifuzon de militservo. Eksterleĝe sed "oficiale" estis starigita de tiama ministro pri defendo iu "interna ordo" (tiel konata ene de la kontraŭ-militserva movado), laŭ kiu ĉiuj rekrutoj petantaj konscienc-rifuzan statuson eniris "prokrastitan ensoldatiĝon" atende de nova leĝo, ĉar evidentis eĉ por la ŝtato, ke ĉi 1976-a leĝo tute malutilis antaŭ novaj cirkonstancoj (ekskresko de malekleziula rifuzado fronte al sekta aŭ eklezia, kiel estis la kazo de atestantoj de Jehovo).

Kurioze kaj "danke" al tiu ĉi senleĝa provizora situacio mi povis senprobleme kaj sen ekscesaj burokrataĵoj validigi mian kontraŭ-militservan rifuzon (sola ĝeno estis, ke kelkaj fifunkciuloj



jen patrinece klopodis min konvinki militservi, jen sarkasme taksis min "kriplulo"). En la loka rekrutejo kaj en la barcelona rekrut-registrejo mi bezonis nur parolan deklaron, ĉe kiu oni ne postulis de mi aldonan ideologian klarigon aŭ deklaron. Pli streĉa estis la atendo de novaj leĝaj eventoj aŭ politikaj reversoj, kiel estis la fiaskinta armea puĉo en 1981, kiu plifortigis mian decidan milit-rifuzemon.

Nova leĝo venis post kelkaj jaroj (1984), aprobita de la registaro de Felipe González; ĝi enhavis tute ne akcepteblajn elementojn eĉ suspekto nekonstituciajn: postulo de ideologiaj pravigaj argumentoj, neakcepto de konscienc-rifuzado kiel rajto, ktp... kio incitis nin ĝin rifuzi unuige, pere de kolektiva deklaro sendata al oficejo por reguligo de konscienc-rifuzado. Ŝtata respondo venis nur jaron poste kaj pere de ĝi mi kaj plimulto estis oficiale akceptitaj de tiu ĉi oficejo: paradokse!

Eble mi naivegis aŭ tro entuziasmis, sed mi neniam timis punon aŭ malliberigon; male, mi sentis-fidis, ke nia movado jam ege decide vekis simpatiojn kaj avangardis pozitive (la sento ke ĝenerale kaŝa simpatio aŭ espero je nia movada strategio malebligis ĉian tro punan ŝtatan respondon...). Kaj fakte la ŝtato ĉiam ŝtupigis sian reagon (ruze aŭ ne) laŭ siaj strategioj kaj intereso: neniam ĝi estis rekte aŭ tro evidente perforteca. Mia opinio, tio parte ŝuldiĝis al la efiko de neperforta strategio adoptita de la konscienc-rifuzo movado mem.

Malcerteco pli-malpli ekzistis dum 8-9 jaroj, ĝis en 1989 mi ricevis leteron informantan, ke oni deklaris min rezervulo. Sed pli precize la unuaj jaroj estis interese streĉaj, ĉar antaŭ ĉi tiu konfuza situacio mi devis barakti kontraŭ memizoliĝo kaj rezulte de tio venis la unuaj kontaktoj, asociiĝoj, enasociaj diskutegoj, ktp. Danke al tiu provizoreco mi eklernis ensociiĝi alternative kaj fleksebligis miajn dialogajn starpunktojn, kio finfine iel - mi perceptas - pli firmigis mian maturiĝon ol eventuale estiĝus ĉe obeema certeco ene de militservado: mi ne sentis la neceson provizi min per la mito, ke nur per militservado oni atingas respondecan maturiĝon; mi opiniis male.



Prononco de nomoj

- Millán Astray** [mijan' astraj']
- Felipe González** [felipe gonsales]
- Xavier Rodon i Morera** [ŝavier' rodon' i morera]
- Jordi Armadans i Gil** [jordi armadans' i ĝil]
- Jordi Moliné** [jordi moline']
- Joan Ferriol Masip i Bonet** [juan' feriol' masip' i bonet']
- Josep Maria Moragriega i Andrés** [juzep' maria moragriega andres']
- Francisco Franco** [fransisko franko]
- Josep Maria Milla i Saldon** [juzep' maria milja i saldon']

Por civilservo

Nomo: Jordi Armadans i Gil (26-jara)
Okupo: ĵurnalisto, studento pri politiko.
Neoficialaj okupoj: KEJ-membro
Antecedentoj: En 1986 li fariĝis rifuzanto kaj amnestiigis en 1989.

Kio estas via opinio pri civil-servado kaj malobeo?

Tiel kiel la militservo estas strukturita (daŭra kunvivado sub rigida armea disciplino), ĝi fariĝas iaspeca eksperimento de socio, kie valoroj kiel aŭtoritatismo, blinda obeado, disdegno de la homa vivo, perfekte kombiniĝas kun vertikala strukturo, militisma kaj neniel partopreniga. Tiujn ĉi dinamikojn eniras la junuloj, kiuj poste, pli aŭ malpli, vole-nevole, reproduktados ilin en sia socia medio: familio, laboro, asocioj... Estas pro tio, ke ĉiam mi pensis, ke la atingo de veraj Civilaj Servoj kun strukturo kaj karaktero alternativaj kaj neperfortaj (sendepende de la ebleco de ilia ekzisto en la kadro de la leĝaro) povas ĝuste helpi diskonigi kaj disvastigi novajn valorojn, novajn strukturojn, fakte novajn homajn modelojn de kolektiva organiziĝo, socia kaj politika.

Kvankam mi ĉiam kontraŭstaris la nunan leĝon, la fakto estas, ke ĝi permesis realigi sociajn servojn en ne-registaraj organizoj kun alternativa, porpaca kaj ekologiisma karaktero. Tamen, por ke la junularo ekakceptu konscienc-rifuzi estas necese disponigi al ĝi validajn instrumentojn, ne proponi al ĝi heroajn vojojn de absoluta ribelo kontraŭ la leĝoj.

Ĉu vi kredas, ke la ŝtato rajtas forpreni jaron de ies vivo?

Kion mi plej multe malŝatas de militservo estas ĝia militisma kaj genocida karaktero, ĝia profunda subvalorigo de la homa vivo. Evidente, ankaŭ ĝia deviga aspekto ne plaĉas al mi, sed mi opinias eraro kritiki kaj kondamni same militservon kiel civilservon en popola pacisma asocio. Antaŭenmeti la demandon pri devigeo de la militservo kaj samtempe duonrangigi la kontraŭ-militisman kritikon, kiel kelkaj kontraŭ-konskripciaj organizoj faris, estas grava eraro. Ĝi kondukas al malobeado, kiu estas tre radikala kaj laŭdinda je persona kaj formala niveloj, sed tre ambigua kaj enhavomanka je ideologia nivelo.

Kiuj estis la konsekvencoj de la amnestio de 1989 por la konscienc-rifuzo movado?

Ĝenerale oni konsideris, ke la amnestio, kiun la registaro estis iam aplikonta, estas politika decido kun du celoj: unu, fari juston al la plej aĝaj rifuzintoj, kiuj, ĉar ili estis fariantaj neniu servon, havis grandajn malfacilaĵojn trovi laboron kaj ĝui stabilan vivon; kaj la alia, malfortigi la konscienc-rifuzan movadon emeritigante la plej aĝajn kaj antaŭvideble ankaŭ la plej konsciajn kaj radikalajn aktivulojn. Tamen, praktike, la afero ne estis tia. Mi mem aktive partoprenis la movadon de 1988 ĝis 1992, t.e. kiam mi jam sciis, ke mi devos fari neniu servon. Pli ol duono de miaj kunaktivuloj estis same amnestiitaj.

(Daŭrigo paĝoturne)




La nombroj de la objetado

Petoj je objetado Alvokoj por anstataŭa servo

1985	12 170	—
1986	6 407	—
1987	8 897	—
1988	11 049	647
1989	13 130	2 910
1990	27 398	4 166
1991	28 051	5 750
1992	42 454	17 589
1993	68 209	26 778
1994	6 644	—
Sume	224 409	57 840

La objetantoj laŭ provinco

Procentaĵo de objetantoj rilate al la nombro da rekrutoj



Kontraŭ diskriminacio


Jen la unua civil-servanto, kiu malobeis la konscienc-rifuzan leĝon. Nuntempe, kiel li, kvindeko da katalunaj junuloj decidis ne plentempe labori en civila servo. Necesas aldoni, ke post la lasta reformo de la konscienc-rifuza leĝo militservo longas 9 monatojn kaj civilservo 13.

Nomo: Jordi Moliné (24-jara)

Okupo: Magazenisto

Neoficialaj okupoj: Aktivas en kristanaj grupoj kaj en la ĉefa kataluna sindikato

Antecedentoj: Konscienc-rifuzanto ekde 1989. Plenuminte la civilan servon dum 12 monatoj, septembre de 1991 li forlasis ĝin malakorde kun ĝia pli granda daŭro (18 monatoj) kompare kun militservo (12 monatoj).



Kie vi plenumis la socian servon?

En ne-registara organizo, nome Kristana Junularo el Laboristaj Kvartaloj de Katalunio. Mia tasko estis iomete dinamismigi la agadon de la asocio kaj krome konsciigi kaj disvastigi la ideojn de konscienc-rifuzado kaj paco al la homoj en la asocio kaj ekster ĝi per diversaj rimedoj, ekzemple per prelegoj.

Kiun sencon havas komenci civil-servon kaj ĝin forlasi jaron poste?

Ekde la komenco mi asertis, ke mi ne kontraŭstaras socian servon, se ĝi estas paca alternativo al militservo. Tamen sensencas esti diskriminaciita kompare kun tiuj, kiuj militservas. Mi ne aprobas la nuntempan leĝon, ĉar ĝi estas puna kaj diskriminacia: socia servo daŭras pli, ĝi okupas laborpostenojn, oni devas beni viajn kialojn por militrifuzi, neniuj rajtas konscienc-rifuzi jam komencinte la militservon.

Ĉu via ago estas komparebla al tiu de militserva dizertanto?

Ne. Mi ne dizertis. Mia forlaso estis nekonsenta ago fronte al leĝo, kiun mi taksas maljusta. Dizertado signifas ne plenumi, sed mi plenumis, kion mi konsideris justa: jaron da socia servo.

Kio okazis viakaze, en la ununura procezo pro ne finfaro de civila servo?

Mi devis ĉesi la dekduan monaton de soci-servado, sed pro burokrataj problemoj mi tion faris du tagojn antaŭ la dektria monato. En la momento, kiam la juĝistino, kiu zorgis pri mia kazo, vokis min, jam ekvalidis la reformo de la konscienc-rifuza leĝo kaj la socia servo reduktiĝis al 13 monatoj. La juĝistino, por eviti problemojn al mi, decidis retroaktive apliki tiun reformon kaj la novan regularon en mia kazo.

Rememoroj de eks-soldato


Ni volas tamen prezenti alian flankon de la monero. Jen la nura nuna kataluna membro de KEJ, kiu iam soldatiĝis, ĉefe por ne perdi sian laboron. Lia militservo tamen ne plene longis.

Nomo: Joan Ferriol Masip i Bonet (24-jara)

Okupo: Komputila grafikisto.

Neoficialaj okupoj: KEJ-membro

Antecedentoj: Eksa ano de kontraŭ-militserva movado. En 1988 li ekmilit-servis, sed nur 5 monatojn.



Kia estis la etoso inter la kamaradoj dum la militservo?


Mi militservis en Saragoso (nun ĝi estas tute hispanlingva urbo, kvankam ekzistas kelkaj aragon-lingvanoj). Sed en la kazerno duono de la soldatoj estis katalunaj kaj alia duono,

Ĉu vi pentas?

*Ĉu vi pentas nun, ke vi militservis?
Dum la rekrutad' vi ja vere vervis
Tiam pensis vi "mi fariĝos viro"
rampis kun fier' tra la kot' kaj ŝmiro
Ho! Kia malbonŝanc', startas nun milito
Ĉu surpriziĝas vi? Ha! Kia hipokrito!
Nun pafas vi al land' kie vi jam estis
Jes, vi vizitis ĝin, kaj vi tie festis en la IJK.*

*Ĉu vi pentas nun, ke vi militservis?
Dum la bombatak' vi ja vere nervis
Nun malamikarme venas kun impeto
Saltu el la fosaj', levu bajoneton
Fimalamiksoldat' frapas vin altere
Lian indulgon nun petas vi sincere
Kaj li retenas sin kvankam li pikontis
Kaj vi rekonas lin, vi lin jam renkontis en la IJK.*

(teksto kaj muziko: Börje Lund)



valenciaj; estis nur kelketaj hispanlingvanoj, la aliaj ĉiuj, katalunlingvaj. Komence estis malpermesite paroli "nekompreneblajn kaj nekonatajn dialektojn": estis devige paroli la hispanan, sed fakte inter ni, ĉiuj parolis katalune (eĉ pluraj hispanlingvanoj, kiel sekreton lingvon antaŭ la estroj). La militistoj ne sciis, kion fari. Kiam ili diris "Ĉesu paroli katalune!", oni respondis "Pardonu, sed ni parolas valencie". Kiam ili diris "Ĉesu paroli valencie!", oni respondis "Pardonu, sed ni parolas katalune". Unue oni intencis aresti tiujn, kiu ne parolis la hispanan, sed finfine ili tion ne povis fari, alie la tuta soldataro estus arestita. Eĉ foje valencia serĝento direktis defiladon katalune. Tio estas unu ekzemplo, kion oni faras tie por ne senti sin tiom kulpa. Estas aliaj. La tagon, kiam ni devis ĵuri fidelecon al la hispana flago "ĝis la lasta guto de nia sango", ene de nia ganto ni metis katalunan flageton. La rito estas, ke ĉiu soldato devas preni unu post la alia la hispanan flagon kaj kisi ĝin, sed anstataŭ ilian standardon ni kisis nian fingron, kiu kaŝis nian flageton. Kiam ĉiuj devis unuvoĉe ĵuri fidelecon, perfekte aŭdeblis krioj en la kataluna: "Iru feken!".

Tie, oni instruis al ni, ke Hispanio estas unu, ke nia devo estas konservi tiun unuecon, ke la ĉefa kialo de la armeo estas, ke Hispanio ne disrompiĝu, kaj oni montris al ni kiel ekzemplojn eŭskojn kaj katalunojn, kontraŭ kiuj ni devos batali, se ili kuraĝus minaci la sanktan patrujan unuecon. Kaj krome, oni sentas sin tre-tre humiligita. Tie vi lernas sentiĝi ŝafo en la grego, ĉar oni humiligas ne nur vin, sed ĉiujn samtempe, kaj vi tute ne povas reagi kontraŭ tio: vi ne estas homo, sed soldato; vi devas lerni ne pensi, sed obei. Finfine, por ne senti sin senpova, oni iĝas roboto: sen pensi, oni estas pli feliĉa. Neniam mi vidis pli da drogoj kaj alkoholo ol en la kazerno; neniam mi vidis tiom da drinkuloj kaj narkotuloj kiel tiam.

Vi tamen ne eltenis en la kazerno? Kial?

Post iom da tempo ene, oni al kutimiĝas al la tiea infera vivo, oni povas eĉ ĝui ĝin. Tio estas psika defendo. Sed fakte mi sentis min kulpa kaj do provis ĉiujn eblojn por liberiĝi. Fine, mi iris al psikiatro: certe mi ne psike bonfartis, sed mi egigis mian senton. Dank' al la psikiatro kaj al pastro, kiu multe helpis min, oni konsideris min psiko-neŭroza ulo ne taŭga por armeo kaj post kvin monatoj mi liberiĝis.

Kiel vi mem agus post via sperto: ĉu vi militservus aŭ rifuzus?

Mi tute ne scias kaj tute ne volas rekonsideri tion. Nun mi estas trankvila, ĉio pasis. Malfacilas alpreni tian decidon. Aŭ vi decidus militservi aŭ civilservi kaj post tio vi jam restas trankvila, aŭ vi ekagas laŭ via pensmaniero kaj rifuzas tion – tiam vi longe atendas juĝon, sen sci, kiam vi eniros malliberejon kaj kiom longe vi restos tie. Se vi decidus servi, mi konsilus al vi civilservi, ĉar elirinte el la kazerno vi ne plu estas la sama.



La movado de malobeado

La movado de malobeado estas unu el la plej gravaj fenomenoj en la hispania kontraŭ-rekruta movado. Miloj da junuloj rifuzas ĉian armean aŭ civilan servon spite al prizon-punoj de pli ol du jaroj. Kvankam nuntempe sepdeko da malobeantoj estas malliberigitaj, plej ofte prokuroroj kaj juĝistoj preferas ne agi kontraŭ ili, atendante, ke la registaro ne plu postulu enkarcerigon de la malobeantoj.

Nomo: Josep Maria Moragriega i Andrés Okupoj: studis geografion kaj historion. Instruisto.

Neoficialaj okupoj: Okupiĝas pri sindikata agado. Membras en la Gej-Liberiĝa Fronto de Katalunio. Aktivas en la kontraŭ-militisma movado de 7 jaroj. **Antecedentoj:** En 1988, li fariĝis unu el la unuaj 57 malobeantoj en la Hispana Ŝtato, kiuj kolektive rifuzis militservi kaj iĝis malobeantoj. Tiel li fariĝis la unua malobeanto kondamnita (al 13 monatoj) kaj efektive malliberigita en armea kaptitejo dum 7 monatoj.

"Ĉe ni, de ĉiam ekzistis movado de rifuzo al deviga militservo. Barcelono fariĝis en 1909 la unua ĉefurbo bombardita de aviadiloj, dum la t.n. Tragika Semajno, kiam barcelonanoj rezistis por ne partopreni militon en Maroko. En la Hispana Ŝtato, la kontraŭ-militisma movado evoluis al tio, kion ni nomas malobeo. Alvenis momento, kiam la lukto-perspektivoj kontraŭ la hispana armeo neprigis renovigon de la ĝistiam konscienc-rifuzo taktiko. Tiu momento estis en 1987, kiam la hispana registaro aprobis leĝon regulantan la konscienc-rifuzadon. Tiam en nia movado okazis debato por kontraŭstari tiun leĝon, ĉar por ni ĝi ne estis la vera alternativo. Tiu leĝo devigis junulojn rifuzantajn militservon plenumi Anstataŭan Socian Servon, kiu karakteriziĝas per tio, ke ĝi signifas devigan punon, havas regularon identan al la armea disciplino kaj daŭras pli ol militservo mem. Ĝi estas ankaŭ kontraŭsocia servo forprenanta laborpostenojn, kiujn devus plenumi la senlaboruloj. Tiu leĝo respondis nur al restrukturiĝo de la senprestiĝiginta hispana armeo. Tial ni decidis krei novan praktikon de civitana malsubmetiĝo neperforta, kiun ni nomas malobeo. Per la malobeo ni kontraŭstaras kunlaboradon en kaj kun la armeo, spitante samtempe la sociservon, kiu fakte punas konscienc-rifuzadon."

Kial la malobeado fariĝis tiel populara ne nur inter junuloj, sed ankaŭ larĝe en la socio?

Kiel sciante, antaŭ nelonge ni suferis en la Hispana Ŝtato diktatorecon, kie la armeo grave rolis. Post la morto de la diktatoro Francisco Franco alvenis nul ŝanĝo en la armeo kaj ne okazis procezoj kontraŭ militkrimuloj. Ekzemple en Argentino, kiam alvenis la parlamenta

(Daŭrigo sur paĝo 13)

Vera kanto kontraŭ militemo estas **Poemo de Uttoa**, unu el la malmultegaj modernaj epopeoj, pri kiu Esperanto povas fieri. Ĝin aŭtoris la kataluno Abel Montagut. Vieno: Pro Esperanto, 1993. 223 p. 24cm. 48,60 gld. ĉe UEA.

La poemo "Ĉu vi pentas?" troviĝas sur la kasedo **62 minutoj** de la sveda E-fokmuzika grupo **Persone**. 27 gld. ĉe UEA.

Martin kaj...

Martin Burkert estas konata de niaj legantoj kiel la ilustristo de la facillingvaj noveloj. Sed eble lia sukcesa kreaĵo, la papago — kiun dorlotas ĉiu numero de la revuo TEJO TUTMONDE, estas pli konata ol li. KONTAKTO vizitis paĉjon kaj idon en Essen, vilaĝo de Germanio, kie ili (n)estas.

Kvankam lastatempe viaj desegnoj ilustras diversajn Esperantajn junularajn publikaĵojn, vi estas ĉefe konata pro la papago de TT...

Pepo: Pepo! Mi nomiĝas Pepo. Cetere, mi ne estas de TT, sed inverse...

Aha, pardonu! Martin, ekzistas ankaŭ bonega porinfana libro aŭtorita de vi, "La arbo, kiu forkuris". Kiel vi komencis desegni por Esperantujo?

Martin: Fakte la libro estis la rekomenco de mia desegna laboro antaŭ 5 1/2 jaroj, kiam mi laboris en Japanio instruante germanan kaj anglan konversacion, ĉar dum tia instrua laboro mi foje devis pretigi ilustritan lernomaterialon ĉefe por infanoj, kaj tiam mi "remalkovris" mian eblan talenton desegni. Jam de longe mi ne desegnis sed intertempe multe skulptis.

Pepo: Jes, kaj li baldaŭ devos reveni al skulptado, ĉar fakte mia busto devas stari ĉe la enirejo de ĉiu IJK-kongresejo... Alia devos stari ĉe la enirejo de la GEJ-oficejo en Bonn... kaj tio estos nur la unua paŝo, antaŭ ol ĉiuj LS de TEJO mend...

Martin: Pepo! Lasu min paroli!

Kiel ekestis la libro?

Martin: La ideo verki la libron venis, kiam mi vidis, ke kelkaj japanaj lernolibroj estas relative... primitive faritaj, mi povus eĉ diri. Do mi pensis: "Mi povus tion fari, sed tiam, kompreneble, necesis havi iun eldonejon kaj venis la demando, kie trovi ĝin kaj kiel entute funkcias tiu afero. Mi vere ne konis la ludon: ĉu la eldonejo antaŭpagas al la verkisto la elspezojn, ĉu la mono venas po libro aŭ ĉu oni entute ne ricevas ion ajn. Ĉiokaze mi aŭdis pri iu sinjorino, kiu vendas Esperanto-librojn en Tokio kaj mi demandis ŝin, prezentante krajniskizojn, ĉu estas iu ŝanco ĉe iu eldonejo trovi la eblon eldoni libron pri iu eta rakonto. Ŝia unua respondo estis kontraŭdemando: "Kiam ni povos presi ĝin?" Mi tre surpriziĝis kaj ĉar mi havis nur du pliajn monatojn en Japanio mi devis do tuj eklabori... Pepo, kien vi foriras?"

Pepo: Se oni malpermesas al mi paroli dum intervjuo, mia verda ĉeesto ne plu havas sencon tie ĉi... Nu, se vi tamen afable petas, ke mi...

Martin: Jes Pepĉjo, bonvolu resti... Bone, mi do diris, ke mi devis tuj eklabori, kaj eĉ dum vesperoj kaj semajnfinoj por pretigi ĝustatempe la libron...

Pepo: Ĝi tamen malfruis du tagojn...

Martin: Ĝi malfruis nur unu tagon...

Pepo: Ne, estis du.

Martin: Estis unu!!!

Pepo: (Estis du! Estis du!)

Kial vi decidigis pri ekologia temo por via libro?

Pepo: Nu, li sentis ioman mankon de konscio pri ekologio en Japanio, kaj...

Martin: Nu ja, tiu estis fakte mia ĉefa celo, iom enkonduki la infanojn en mediprotektadon. Ekzemple dum mia restado en Japanio, mi renkontis nur unu verdulon tie.

Pepo: Verŝajne la solan verdulon en la tuta Japanio...

Martin: Pepo! Nun mi ne plu toleros! Via ĉeesto ne plu estas dezirata! Vi povas iri for!

Pepo: En ordo. Cetere, mi havas multajn pli gravajn aferojn por fari. Ĝis iam. (Li forflugas).

Martin: Pardonu, vere. Pepo ja estas papago. Do, mi parolis kun tiu esperantista

verdulo pri la verdula situacio tie. Kaj estas li, Kitagawa Hisasi, kiu tradukis la libron en la japanan lingvon. Ĉiuj tekstoj estas en la Esperanta kaj en la japana.

Kio portis vin al Japanio?

Martin: Mi aĝis 22, kiam mi iris al Azio por ĝin travojaĝi dum unu jaro, duonon el kiu mi pasigis en Japanio. Tie mi trovis la eblon labori. Jam en Germanio mi estis aŭdinta, ke en tiu lando estas bela eblo trovi laboron kiel konversacia lingvo-instruisto, kio estas relative facila laboro kaj sufiĉe bone pagata. Krome mi estis aparte bonŝanca, ke ĝuste en tiu momento estis granda euforio pri la germana, ĉar ĵus falis la germana muro kun ĉiuj ties sekvoj; multaj, ekzemple, deziris refreŝigi siajn konojn pri la germana.

Kiel ekestis Pepo?



Martin: Mi fakte ne scias, kiel oni eksciis, ke mi kapablas iomete desegni, ĉu eble pro la libro? El la Bonna oficejo venis peto, ĉu ne eblos fari iun simbolfiguron por TT. Tie la homoj longe pensis pri iu taŭga besto. Oni konsideris serpentojn kaj drakojn... sed finfine oni trovis la solvon, papagon, kiu estis ideo de Remi Rudaityte. Ili skribis al



mi, ke urĝe, ene de unu semajno, ili bezonas kelkajn papagojn. Fakte intertempe tiu papago iom evoluis, antaŭe ĝi estis pli simpla.

Kiu estis via inspironto? Ĉu eble la papago de iu najbaro?

Martin: La tagon, kiun mi ricevis la peton pri la papago, mi estis vidinta ie foton de tia birdo. Mi havas bonan memorkapablon pri viditaj aferoj, do provis memori, kiel aspektis tiu papago kaj poste ekdesegnis ĝin — karikature, kompreneble. Mi provis eble du tri-foje sur iu malnova paperaĉo kaj... jen aperis Pepo!

Pepo: (Aperas de malantaŭ la fenestra kurteno) Ĉu iu vokis min? Mi povas disponi pri kelkaj minutoj, do se...

Efektive, mi povas profiti por iom foti vin ambaŭ. Pepo, ĉu vi bonvolus stari sur la ŝultro de Martin?

Pepo: Jes, mi volonte faras tion! Ĉu mi devas tiri iliajn harojn aŭ ion tian? Mi povas ankaŭ...

Kiom longe averaĝe prenas fari unu desegnon, kaj kiom daŭras desegni unu Pepon?

Martin: Tio tre dependas de la komplikeco. Desegni homon povas preni inter 20 kaj 30 minutojn. Kovrilo de *PASPORTA SERVO* ĉirkaŭ 2 horojn. Foje necesas surglui punktar-folion por grizigo, kio povas preni sian tempon. Intertempe unu papago, eble 10 aŭ 15 minutojn, sed foje la desegno estas pli komplika, ĉar li devas havi kelkajn aĵojn ĉirkaŭ si. Sed nuntempe la papago estas facila afero. *Desegni* lin estas facile, *elporti* lin estas io alia...

Pepo: Kaj per tio kion vi celas? Ĉu vi estas pli facila homo ol mi...? Mi atendas respondon, kaj pardonpeton ankaŭ...

Nu, estas konate, ke ĉiuj genioj estas iom specialaj... (Pepo, flatita de mia komentario, preskaŭ ekronronas. Martin komencas grati malantaŭ lia kapo, kio evidente plaĉas.)

facila

Krucvorto

Klaus Dahmann, Germanio

Sendu vian solvon al nia redaktejo antaŭ la 31-a de decembro 1994. Vi povos gajni libropremion!

Ĉu vi kapablas krei facillingvajn (laŭ la KONTAKTO-vortolisto) krucvortojn? Se jes, sendu ilin al nia redaktejo por publikigo! Klopodu uzi ne tro da lok-nomoj aŭ mallongigoj, ĉar komencanto ne ĉiam rekonas ilin. Se viaj krucvortoj estas simetriaj, do kun sama dismeto de nepleniĝendaj kvadratoj dekstre kaj maldekstre, ĝi aspektos multe pli bele. Kuraĝon, kaj koran antaŭdankon!

urso: granda besto, kiu dormas dum la tuta vintro

fama urseto* (de A.A. Milne)		1		fama nederlanda muzika Esperanto-grupo		suda eŭropano
portas al vi leterojn		havas kiel ĉefurbon Florencon				valoran metalon
via ŝatata revuo				grup'		
vestaĵoj por la piedoj				aŭtosigno por Hispanio		
ronda ludilo	E-signo					
	kiuj estas de li					
				part'		
				uj'		
de si			lasta litero de Esperanto		kemia signo de nobelio	moviĝ', pieda paŝad'
land' en Afriko						
irejo						
			afer' kiu batas pro amo			

Kvankam vi studas medicinon, vi desegnamas kaj estas bonega komikisto sursceneje. Kiel vi klarigas tiun kontraston?

Martin: Ĉu vere estas iu kontrasto? Inter miaj kunstudentoj estas multaj, kiuj havas iun artisman talenton, jen por muziko, jen por pentrado aŭ alia. Krome mi trovas, ke plejparto el la fakoj de medicino havas "ion artan", do mi sentas min tute normala.

(Pepo ekdormiĝas sub la karesado.) Ĉu vi planas labori kiel kuracisto?


Martin: Jes, mi esperas! Nuntempe en Germanio estas 30 000 senlaboraj kuracistoj, kaj oni fakte ĉesis doni al ili la rajton malfermi propran konsultojn; ili povas transpreni ĝin de alia kuracisto, sed propra ne plu eblas. Oni taksas, ke tio daŭros almenaŭ 10 jarojn, ĉar laŭdire estas tro multaj kuracistoj. Kvankam la realo estas verŝajne alia, ĉar ofte oni devas atendi ĉe kuracisto dum horoj, sed tia estas la leĝo. Tamen, mi tute ne sentas min ligita al Germanio, aparte ekde mia esperantistiĝo. Mi sentas min mondĉivitano, tiel ke mi ne fleĝas iun specialan rilaton al Germanio, krom al tiu regiono, kie mi naskiĝis kaj vivis la unuajn vivojarojn. Do se eksterlande oni akceptos min kun mia medicina diplomo, mi povos labori en kiu ajn alia lando.

Ĉu vi neniam konsideris iĝi profesia desegnisto?

Martin: Ne. Kiam mi estis tre, tre juna, mi volis iĝi pentristo, sed tio estas, kiel oni diras en la germana, "sen-pana arto". Oni ne ricevas bonan salajron por io tia. Kaj se oni vere multege laboras kiel ilustristo, karikaturo, bildstriisto aŭ simile, oni dum la tuta tago faras nenion alian ol desegni. Kaj mi volas, ke tio restu hobia, bona amuzajo, bela distraĵo.

Koran dankon, Martin. Aparte pro Pepo, kiu ŝajne definitive endormiĝis...

Martin: Jes, tiu malantaŭkapa karesado ĉiam efikas. Felice.



La arbo... kiu forkuris estas, krom belega, interesa libro. Martin Burkert, originala en Esperanto kun paralela traduko en la japana. Tokio: Libroteko Tokio, 1990. 38 p. 26 cm. Prezo: 19,20 gld. Havebla ĉe UEA.

anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri informaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

18-jara komencantino.

atendas mondan leterlavangon, ĉefe el eks-sovetiaj, sudamerikaj, okcident-aziaj landoj. Ankaŭ ruse kaj latve eblas respondo. Dzile Briede "Anŝkinos" LV-3720 Kronauce, Dobeles raj. Latvio

Neniu volas korespondi pri rokmuziko! Ĉu vi?

27-jarulo despere serĉas samhobianojn. Viktor Kriŝtapov Chkalova str. 33-14 BY-220065 Minsk Bjelorusio

17-jara kaligrafino

deziras korespondi kun keltoj, ankaŭ kun britoj, danoj, irlandanoj kaj nederlandanoj. Anna Maria Welsch J. Gagarina 239/35 YU-11070 Beograd Jugoslavio

18-jara junulo

deziras korespondi pri diversaj sportoj kaj sciencoj, i.a. pri kosmoscienco. Abdulreza Ŝahbazi Coastal Str. Bandar Daylam 75-361 Busher Province Irano

facila


Eto al la infero!

J rakontis: estis tre malvarma tago, ho miaj karaj, kiel povas foje esti en la tatara regiono; la temperaturo* estis almenaŭ minus kvardek gradoj*. Mia plej bona ĉevalo forkuris de mia domo, kaj mi eliris en la malvarmon por serĉi ĝin. Mi iris tra la tuta vilaĝo, sed nenie ĝi estis. Tiam mi decidis iri laŭ la vojo al alia, apuda vilaĝo. Mi piediris malrapide sed alvenis vesperiĝe al la vilaĝo, ankoraŭ sen trovi mian karan ĉevalon. Estis tre malvarme, karaj, mi estis preskaŭ nur glacio, kiam mi venis al iu domo, de kie mi aŭdis sonojn, kaj kie estis lumo interne.

Mi eniris, kaj tie vidis multajn virojn preĝi starante. Inter ili mi vidis iun maljunulon, kiu havis nek puloveron*, nek ŝuojn, nek ŝtrumpojn. Tute nud*-pieda kaj en ĉemizo maldika li staris tie, kaj tute klare li frostis tre. La viroj ĉirkaŭ li nenion rimarkis, sed nur daŭrigis preĝi, ĉar estis la preĝa horo de bonaj islamanoj.

La maljunulo vidis min, kaj nun mi rekonis lin: li estis de iu apuda vilaĝo, kaj ni foje renkontiĝis somere en vendo-placo*. Li komencis puŝigi tra la preĝantoj, miksante la preĝon, venante en mia direkto, kaj li kriis al mi: "He, amiko mia, ĉu vi vidas, ke mi frostas? Miaj vestaĵoj estas tute malsekaj, ĉar mi falis tra la glacio en la lagon apudan, kaj mi do tuj venis ĉi tien kaj forprenis ilin por sekigo, kaj por varmigi min. Sed tiuj ĉi stultuloj eĉ ne donas al mi alian puloveron, ili nur preĝas kaj preĝas kaj nenion rimarkas! Ho, amiko mia, se mi ĉi tie vidus la diablon*, mi petus lin lasi tiujn ĉi stultulojn kaj kunporti nur min al la infero*, ĉar almenaŭ tie estas varme!"

diablo: mal-dio. Plej granda kontraŭulo de Dio
grado: mezur-unuo por varmecco aŭ malvarmecco
infero: loko, kie la diablo punas tiujn, kiuj estis malbonaj sur la Tero
nuda: sen vesto
placo: libera loko ĉirkaŭita de domoj, en urbo aŭ vilaĝo
pulovero: dika varma vesto por la supra parto de la korpo
temperaturo: alteco de varmo aŭ malvarmo




FRANÇO 94

LA FABELA LANDO ELDORA

Atiljo Orellana Rojas, Argentino

Post la alveno de la unuaj eŭropanoj al Ameriko kun Kristoforo Kolumbo en 1492, pluraj aliaj aventuremuloj kaj soldatoj komencis la konkeradon de la tuta kontinento, altiritaj de la famo pri nenombreblaj riĉaĵoj, inter kiuj aparte brilis Eldorado.



En la popola scio de la tiutempaj eŭropanoj, Eldorado estis mirinda lando, kies grundo estas plenŝtopita je oro. Tio vere fascinis tiujn homojn, avidajn je riĉaĵoj, kaj por tiuj, kiuj dubis pri la afero, la trezoroj rabitaj en Meksiko flanke de Cortés kaj de Pizarro en Peruo povis nur konfirmi la realan ekziston de tia regno.

Dum pli ol du jarcentoj multaj homoj ekis al ekspedicioj, kiuj finiĝis nur en tragedio kaj sango. Tio, tamen, permesis al Hispanio la senpaŭzan koloniigon de la norda regiono de Sudameriko.

La mito pri Eldorado devenas de la legendo pri la "ora homo". La historiisto kaj kronikisto Gonzalo Fernández de Oviedo estis la unua, kiu menciis, en 1534, la ekziston de tiu loko. Tamen, jam multe

ABONTARIFO DE KVIARTO 1995

Argentino/guldano	20	Franco/franko	125
Aŭstralio/dolaro	30	Germanio/marko	37
Aŭstrio/ŝilingo	245	Greklando/drakmo	3600
Belgio/franko	765	Hispanio/peseto	2100
Brazilo/guldano	20	Hungario/forinto	1200
Britio/pundo	15	Irlando/pundo	14
Bulgario/guldano	20	Islando/guldano	39
Ĉeĥio/krono	310	Israelo/guldano	32
Danlando/krono	150	Italio/liro	30 000
Finnlando/marko	115	Japanio/eno	2880

Kanado/dolaro	29	TARIFO Alguldano	25
Korea Resp./guldano	31	TARIFO Biguldano	20
Nederlando/guldano	41	ALIAJ LANDOJ:	
Norvegio/krono	150	Luksemburgio laŭ	
Novzelando/dolaro	38	Belgio; San-Marino laŭ	
Pollando/guldano	20	Italio.	
Portugali/eskudo	2500	TARIFO A: Honkongo,	
Slovakio/krono	340	Malto, Singapuro,	
Sudafriko/guldano	35	Tajvano.	
Svedio/krono	170	TARIFO B: Ĉiuj ceteraj	
Svislando/franko	31	landoj ne jam menciitaj.	
Usono/dolaro	22		

Rabato por kolektivaj abonoj (minimуме 10 ekz.): 20%, se ĉiuj numeroj estos senditaj rekte al la unuopaj ricevantoj; 40%, se ĉiuj estos senditaj al unu adreso.

EL ORO, ADO

antaŭ tio la hispanoj aŭdadis pri tiu regno, lokiĝanta ie en la Nova Mondo.

La ĉibĉa tribo el Cundinamarca [kundinamarca], "Kondorlando", en la nuntempa Kolombio, ĉiujare celebris interesan ceremonion: dum ĝi la tribestro sin ŝmiris per testuda graso kaj pulvorigita oro kaj poste iris meze de siaj ĝoje kantantaj

subuloj dum tamburojn oni senpaŭze frapadis. La reĝo kaj la nobeloj enboatiĝis kaj de tie ĵetis smeraldojn kaj oron en la lagon Guatavita [guatavita] kiel oferon al dioj. Fine, la tribestro plonĝis en la lagon kaj reaperis meze de tondraj aplaŭdoj.

De tiu ĉi fakto naskiĝis la legendo pri la "ora homo", poste baptita Eldorado. Jaron post jaro la mito pli kaj pli ŝanĝiĝis kaj Eldorado transformiĝis en regionon plenegan je oro, kie eĉ stratoj estis el tiu metalo kaj la domoj estis kovritaj per arĝento kaj ĉiuspecaj juvelŝtonoj.

La unua ekserĉi Eldoradon estis tre kruela homo: la germano Ambroise Alfinger. Li financis siajn vojaĝojn, inter 1529 kaj 1538, vendante indianojn kiel sklavojn en Santo Domingo.

Forirante de Coro [koro], tiama ĉefurbo de Venezuelo, kaj suprenirante la riveron Magdalena, li masakradis plurajn tribojn por eviti, ke ili poste rivelu pri lia misio. Tamen, post pluraj jaroj da serĉado li devis forlasi la ideon: dum batalo kun indianoj

La "ora homo". Kiu alia ol la Granda Zipa de ĉibĉoj, kiujn du subuloj ŝmiras per graso kaj blove kovras per pulvorigita oro?



Gravuraĵo (detalo) de Theodor de Bry, Frankfurt, 1590 (Brita Muzeo)



Fot. Francjo, 1994

Atiljo Orellana Rojas n. 1963. Argentinano, prof. pri klasika filologio kaj instruisto pri germana kaj rusa lingvoj. Studis la keĉuan kaj verkis plurajn studojn pri ĝi. Kunlaboras pri tiu fakto kun diversaj publikaĵoj kaj organizaĵoj. Cseh-instruisto, dum la lastaj jaroj trairas la mondon disvastigante Esperanton.

Tibor Sekelj
Kumeŭaŭa
Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!
Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

meze de la ĝangalo li estis trafita de venenita sago kaj iom post tio mortis.

Tamen, ĉi tiu fakto tute ne malkonvinkis la aliajn avidulojn. Ja sekvis vojaĝoj de Jorge de Spira, Nicolaus Federmann, Sebastián de Celcazar kaj multaj, multaj aliaj. Nur unu, tamen, sukcesis ion: la hispano Gonzalo Jiménez de Quesada, maljuna advokato, kiu estis poste baptita de sia biografiisto, Germán Arciniegas, per la kromnomo "La Kavaliro de Eldorado". Post longa kaj malfacila vojaĝo, dum kiu liaj ekspedicianoj estis ofte atakitaj de indianoj kaj mortis pro diversaj tropikaj malsanoj, finfine li eniris, en januaro de 1537, en Cundinamarca konkerante ties ĉefurbon, Bogoto. Tie li efektive trovis oron kaj diamantojn, sed nenion, kio minimume similas al tiuj senfinaj orrezervejoj menciitaj de la legendo. Ĉi tia seniluziigo konvinkis la hispanojn, ke Eldorado troviĝas... aliloke. Pro tio inter 1559 kaj 1569 ili vojaĝis, kvankam vane, orienten, al la regiono de Gvajano kaj rivero Orinoko.

Malgraŭ la fiaskoj, la oraj revoj pluvivis ankoraŭ en la 16-a jarcento. Tiel, ekzemple, de 1584 ĝis 1597 Antonio de Berrio vane serĉadis tiun mitan regionon. Li eĉ estis nomumita guberniestro de Eldorado, sed 15 jarojn post tio li mortis neniam trovinte la teritorion, kies regado estis lia tasko.

La mirindaj informoj de la angla esploristo Walter Raleigh, kontribuis al la diskonigo de la legendo inter la 17-a kaj 18-a jarcentoj kaj eĉ Voltero situis tie unu el la aventuroj de Kandido.

Komence de la 19-a jarcento la mito estis jam preskaŭ forgesita. Tamen, pro peto de hispanoj, kiuj ankoraŭ kredis je la ekzisto de la orlando, la germana sciencisto Humboldt esploris la valojn de Apure kaj Orinoko. Liaj topografiaj notoj ne permesas alian konkludon: Eldorado entute ne ekzistas.

En 1954 kolombiaj arĥeologoj informis, ke iu meteoro falis antaŭ milo da jaroj en la lagon Guatavita. La ceremonio de la "ora homo" rekreas tiun fakton, kaj estas samtempe rita ofero al la dio, kiu kune kun la meteoro eniris la lagon. Tiel do evidentiĝas, ke multaj aviduloj vane kaj multe suferante persekutadis nur ĉielan ŝtonon, kies vera lumo eĉ antaŭ multaj jarcentoj estingiĝis. □



tre
facila

RLETA malfeliĉis. La rilato kun Filipino estis tiel bela dum la unuaj jaroj post la geedziĝo! Kaj nun ŝajnis, ke ĉio malboniĝas. Kio okazis?

Ŝi repensis pri la komenco de ilia amrilato. Ŝia memoro facile prezentis al ŝi la tutan filmon pri ĝi, ekde la fojo, kiam ili unuafoje renkontiĝis.

Estis ĉe amikoj, kiuj invitis grupon da samaĝuloj kun similaj intereso al plaĉa vespera kun-esto. La vido al la printempa naturo estis aparte bela, la manĝo bonega, la ide-interŝanĝoj vivplenaj, ĉiuj konsentis, ke ne povus okazi pli sukcesa vespero. Kiam Filipino prenis gitaron*, ĉiuj miris pri lia belega maniero ludi. Baldaŭ la tuta grupo komencis kunkanti. Novaj kaj malnovaj kantoj sonis unu post la alia, jen ĝuste kaj bele, jen aĉe sed ride. Foje, post unu el tiuj malsukcesaj, sed rid-estigaj

Ĉu fakso utilos?

Claude Piron, Svislando

kantoj, daŭris minuton, dum kiu neniu pli aŭdigis sin, krom Filipino, kiu plu gitaris senpense. Kaj jen Arleta komencis kanti, sola. La sono estis tiel plaĉa, ke ĉiuj rigardoj direktiĝis al ŝi. Neniu antaŭe sciis, ke ŝi povas kanti tiel mirinde bele. Neniu kunkantis, neniu diris eĉ unu vorton. Kaj kiam ŝi finis, ĉiuj kune petis: "Plian kanton! Kantu plu! Alian kanton, Arleta!"

Arleta pretiĝis por ekkanti ion novan, kiam ŝi rimarkis Filipon. Li rigardis ŝin kiel li rigardus ĉielan estulon, ku ekaperis el neniejo meze de la ĉambro. Lia mirego estis preskaŭ ridiga. Sed ĝin ĉefe markis ek-amo. Arleta plu kantis, multe kaj plaĉe, ĉe Filipa gitar-ludo. Tiuj du geknaboj, per sia sen-prepara arta prezento, igis la tutan grupon feliĉa.

Kiam, malfrue en la nokto, la grupo disiĝis, Filipino petis de Arleta ŝian telefon-numeron. Certe, ŝia sento pri li en tiu unua vespero ne povus nomiĝi amo. Li ne estis bela, ŝi ne vere konis lin, kaj sci-povo bone gitari signifas neniom pri la ecoj de homo. Tamen ŝi tuj donis al li la informon. Sento pri ebla amikeco al-movis ŝin al li.

Ili komencis vidi unu la alian pli kaj pli ofte. Estis klare, ke Filipino amas ŝin multe pli ol ŝi lin. Sed iom post iom ankaŭ en ŝi la amikeco transformiĝis en amon. Kiam ili kunloĝis kaj komencis vere kunvivi, ŝi sentis sin pli feliĉa ol dum sia tuta antaŭa ekzistado.

Sed la vivo ŝanĝas la homojn. Filipino laboris en komercejo, kie li montriĝis pli kaj pli sukcesa, tiel sukcesa, fakte, ke lia situacio de jaro al jaro pliboniĝis. Foje, la direktanto diris, ke li bezonus helpanton, al kiu li pretus havigi interese altan monatan labor-pagon. Kiam li demandis Filipon, ĉu tiu funkcio plaĉus al li, la junulo jesis sen longe pripensi. Tiel li fariĝis gravulo en la komerca mondo. Ĉio estus plej bona, se la situacio en la lando restus senŝanĝa. Sed ĝi ŝanĝiĝis, en nebona direkto. Vendoj iĝis pli kaj pli malfacilaj. Senlaboreco envenis la landon. Homoj ne plu havis sufiĉe da mono por aĉeti la aĵojn, kiujn vendis la komercejo de Filipino. En la lokon de la antaŭa vivfacileco jen zorgado sin metis.

Arleta ĉiam havis multon por diri al la edzo. Sed nun li ne plu aŭskultis. Lia rigardo ŝajnis perdiĝi en kaŝajn pensojn, videble zorgoplenajn. "Se mi ne plu interesus lin, li ne agus alimaniere", ŝi pensis. Estis por ŝi malfacilega tempo. Ŝi timis, ke la tuta feliĉo, kiun ili kune konstruis, post ne-longe disfalos. Por tion malhelpi, necesis fari ion, sed kion?

Ĉar ŝi mem respondon ne trovis, ŝi petis la opinion de sia bona amikino Manjo. Manjo, tiufoje, ne havis multe da tempo. Ŝia labor-donanto iom antaŭe informis ŝin, ke ŝi perdos la laboron. Meze de tro da zorgoj, ŝi ne emis perdi helpe al Arleta la haveblan pensoforton, kiun ŝi plene bezonis por trovi eliron el la propraj problemoj, jam sufiĉe malsimplaj. Tial, sen multe pripensi, nur por senigi sin je Arleta, kies malfacilaĵoj ne interesis ŝin, ŝi diris la unuan ideon, kiu prezentiĝis al ŝi, nome: "Sendu al li fakson*!"

El la parolmaniero de Manjo estis klare, ke la problemo de Arleta ne vere interesas la amikinojn, kiu respondis tiel nur, ĉar ŝi deziris ne perdi pli da tempo pri tiu afero. Kaj tamen, la ideo ŝajnis pripensinda.

Post kelkaj tagoj alvenis en la komercejon de Filipino fakso vortigita jene:

PREMIO DEGUĈI AL CLAUDE PIRON!

Ĉiujare UEA donas la Premion Deguĉi al tiu, kiu per Esperanto antaŭenigas internacian amikecon kaj solidarecon. En tiu ĉi jaro tiu premio iris al nia kunlaboranto Claude Piron. **KONTAKTO** elkore gratulas!

fakso: letero, kiun oni sendas per telefonaj vojoj
gitaro: muzikilo kun formo de virino
rendevuo: interkonsento renkontiĝi je klaraj tagoj kaj horoj

Martin Burkert, 1994

12

n-ro 143 (1994:5)

KONTAKTO

Al s-ro Filipino N.

Kara Sinjoro,

En ĉi tiu tempo malfacila por komercistoj, oni ne lasu bonan aferon forperdiĝi simple pro tio, ke oni ne ricevis informon pri ĝi. Povas prezentiĝi io, kio ŝanĝos vian tutan vivon. Tial estas grave aŭskulti, kion oni diras. Aparte indas aŭskulti edzinon, kiu diras:

Kara Filipino, mi amas vin. Ni estis feliĉaj kune. Sed nun pli kaj pli vi mal-emas okupiĝi pri via familio, kaj pri mi. Antaŭhieraŭ trifoje mi parolis pri la zorgo, kiun kaŭzas en mi la malsano de mia frato, sed tute klare tio ne interesis vin, vi ne vere aŭdis min. Hieraŭ mi parolis pri la decido, kiun ni devas fari rilate al la somera libertempo: se vi volas uzi la montodomon, kiun David akceptas havigi al ni, ni devas respondi al li plej malfrue ĉi-semajne. Sed vi ne aŭdis min. Hodiaŭ dum la matenmanĝo, mi provis paroli pri (...), kaj tiel plu. Post la ekzemploj venis ŝia ideo:

Eble ni povus eliri el la nuna malplaĉa situacio, se ni decidus, ke unufoje ĉiu-monate ni rendevuos*. Per tio mi celas, ke ni uzos la vesperon por interparoli pri ni. Ni povus prepari bonan manĝon, iom specialan, kaj ni interŝanĝus ideojn pri tio, kiel ni travivis la monaton, kio zorgigas nin, kion unu el ni ne

sukcesis komprenigi al la alia, kaj kion ni devos baldaŭ decidi, aŭ pri similaj aferoj. Ni akceptos neniun inviton, ni ne iros vidi filmon, ni ne aŭskultos radion kaj ne rigardos televidon. Estos vespero por ni. Nur por ni.

Filipo tre miris ricevi fakson de sia edzino. Ne ofte oni ricevas leteron de iu, kiun oni vidas ĉiutage. Lia unua reago estis ega malkontento. Ĉu la vivo ne estas jam suface malsimpla en ĉi tiu tempo, kiam la tuta loĝantaro malriĉiĝas, kaj sekve ne plu aĉetas la aĵojn, kiun li devus vendi por viv-teni la familion? Kial ŝi venas per sia nekompreno igi lian vivon eĉ pli malfacila? Ĉu tion si nomas amo?

Por poste povi forta-vorte diri al ŝi, kiom ŝi mis-pensis kun sia ideo sendi tiun leteron, li decidis relegi ĝin. Mirige, je ĉi tiu dua rigardo ŝiaj vortoj aperis tute aliaj. Li sentis tra ili iun malfeliĉan, kiu petegas pri helpo. Iun karan. Kiel li povus forĵeti ŝian peton? La enhavo de la fakso estis ĝusta: de kelka tempo li ne aŭskultas ŝin, kiel li devus. Li lasis tro multe da loko en si al la zorgoj, tro malmulte al la familio. Iom mire pri si, li rimarkis, ke ŝia ideo pri ĉiu-monata rendevuo finfine tute ne malplaĉas.

Kiu kredus, ke tiu simpla rendevuo, ripeta monaton post monato, fakte ŝanĝos lian vivon? Tamen tiel estis. Pace preparoli la aferojn de la monato, decidi pri tio aŭ tio ĉi, aŭskulti ŝin vortigi siajn zorgojn agis al li kiel sanigilo al iu malsana. Liaj labor-zorgoj iel perdis el sia graveco: "Ni sukcesos plu vivi; mono malpli gravas ol feliĉo kaj amo," li pli kaj pli pensis. Li re-ekvidis en ŝi la belulinon, kiu tiel mirinde kantis en la printempa vespero, kiam li unua-foje vidis ŝin. Foje, post la bona manĝo, kiu markis la komencon de la monata rendevuo, li reprenis sian gitaron, kiun de pluraj jaroj li forlasis. Ekde tiu tago, la monata gea kunsido preskaŭ ĉiam finiĝis per kun-gitara kanto. La paco, kiu revenis en la hejmon, havis preskaŭ ĉielan, alimondan econ...

"Feliĉe, ke Manjo retrovis laboron en oficejo," Arleta pensis, post la ĉi-monata kuna vespero, la plej kontentiga el ĉiuj, "mi povos uzi fakson." Jam la morgaŭon ŝi tien faksis al sia amikino:

Kiel vi konsilis, mi sendis fakson. Ĉu vi povas kredi, ke la sukceso superis ĉion espereblan? Dankon, Manjo, dankegon!

(Daŭrigo de paĝo 7)

demokratio, minimume okazis kelkaj purigoj de militistoj. En Britio, Francio aŭ Nederlando estas armeoj, kiuj kontraŭbatalis faŝismon kaj meritis la fidon de la popolo, ĉar ili defendis la burĝan demokration. Tio semas alian konscion en la civitanaro. Kaj ĝuste la sinteno de plimulto de niaj civitanoj permesis al ni havi grandan socian bazon por agadi. La hispana armeo karakteriziĝas per tio, ke plej ofte ĝi agresis ne eksteren sed la propran loĝantaron kaj nia popolo scias tion, ĉar multaj tion devis elteni. Tio donis al ni privilegian situacion rilate la ceteran eŭropan kontraŭ-militismon, kies mesaĝon ne tiel akceptas averaĝaj homoj samkiel ĉe ni.

Kiel ĉio okazis, ĝis oni enkarcerigis vin?

Post 13-taga mallibero, en novembro 1990 la armea prokuroro petis por mi kaj por la alia akuzito du-jaran enkarcerigon, sed la fina verdikto kondamnis nin je 13 monatoj da mallibero. Iom poste, la 15-an de majo 1991, Internacian Tagon de Konscienc-Rifuzado, mi estis denove kondukita en militan karceron por plenumi la punon. Tie mi restis sep monatojn.

Ĉu tiutempe vi ekrlatis al Esperanto?

En la prizono oni klopodas profiti la tempon iel. Tie mi ricevis Esperantajn gramatikon kaj poŝvortaron, kiujn mi ankoraŭ havas, kaj tiu estis mia unua alproksimiĝo al la lingvo. Malgraŭ mia preskaŭa nekono de la Esperanto-movado, ĉefe la tutmonda, mi ŝatas ĝin pro ĝia historia progresema karaktero kaj kiel helpilon de packulturo. Oni profitu tiun vivan ligilon por solidareco inter la popoloj.



Atendante Godoton

Nomo: Josep Maria Milla i Saldon

Okupo: Studis latinan kaj malnov-grekan filologiojn kaj laboras kiel instruisto.

Neoficialaj okupoj: Aktivulo ĉe KEJ

Antecedentoj: Malobeanto al militservo

Kio estas via opinio pri la armeoj?

La armeo estas granda ŝafaro, obeema aŭ trompita, preta mortigi alian samspecan ularon aŭ esti mortigita de ĝi, por defendi la interesojn de elita areto, kiu, kompreneble, ne makulas siajn manojn per sango. La hispana armeo, krome, pretas pafokupi stratojn, se la prezidanto de Katalunio deklaras sendependecon.

Kial de jaroj la polico ne venis serĉi vin? Ĉu vi ne ricevas almenaŭ leterojn de ili?

Eble ili simple ne trovis min... Eble en Madrido oni ankoraŭ ne tradukis mian katalunlingvan deklaron por juĝisto el Kanarioj, kiu eble okupiĝas pri la afero... Kompreneble, en Saragoso, kie mi devus servi, oni ankoraŭ atendas min... Mi de tempo al tempo ricevas sendaĵojn: "Faru kopiojn de tiu ĉi letero kaj dissendu. M. K. tion ne faris kaj lia bopatrino iris loĝi ĉe li. Ankaŭ T. P. ne faris tion kaj suferis gravegan kacsenforton. N. J. ne prezentiĝis ĉe la civilservo kaj oni enkarcerigis lin..."

Kio okazos laŭ vi?

Se mi scius, mi laborus ne kiel instruisto sed kiel sorĉisto! Mi kredas, ke oni agu laŭ siaj konscienco kaj kredo: "Amu, kaj faru kion ajn" (Aŭgusteno el Hipono).



Ami kinon:


Buŝa sekso

Originala titolo: *Sexo oral*
(Hispanujo, 1994)
(Kolora, 87 min.)
Reĝisoro: Chus Gutiérrez

Diras ĵurnalisma regulo, ke aktoro ne rajtas verki recen-
zon pri filmo, en kiu li mem
aktoras. Kial do mi faru tion nun,
kontraŭregule? Simple tial, ke mi
emas. Male, plej multaj legantoj

Kiel sugestas la vortluda titolo,
Buŝa sekso konsistas el frag-
mentoj de intervjuoj kun 55 divers-
aĝaj personoj pri ĉi ties sekso
vivo, simile al la fama *Sekso*,
mensogoj kaj vidbendoj (*Sex, lies*
and videotapes, Steven Soder-
bergh, Usono, 1989), sed ne-
fikcie. Malgraŭ tio en Madrido ĝi
spekteblas en kinejo por normalaj
filmoj. La plimulto el la intervjuitoj
aĝas inter 25 kaj 40 jarojn, sed
pli ol deko estas emeritoj.

Chus Gutiérrez, kiu verkis la
skripton kaj reĝisoris la filmon kun
la helpo de la aktorino Iciar
Bollaín, demandis la intervjuatojn
pri jenaj temoj: unua sekso sperto
en la infanaĝo; unua amora sperto;
seksaj fantazioj; rilato inter amo kaj
sekso; opinio pri masturbado, mal-
fideleco kaj pornografo ktp. Ne ĉiuj
respondis pri ĉio same longe, sin-
cere aŭ senĝene. Kelkaj parolis pli
amuze, kelkaj iom blufe, aliaj fole
aŭ drole... Entute la filmo prezen-
tas interesan bildon kvazaŭ doku-
mentan pri la sekso vivo de
nuntempaj hispanoj. Kvankam ĝi
neniel ambicias aŭ pretendas
kompletecon aŭ profundecon, mi
rekomendas ĝian spektadon al



Gardeno de delicioj (detalo) de J. Bosch

de *KONTAKTO* neniam aŭdus pri
Buŝa sekso, kvankam povas
okazi, ke post unu aŭ du jaroj
projekcios ĝin kelktage ia landa
filmoteko aŭ urba kinoklubo. Ĉiel
ajn mi aperas sur la ekrano dum
nur tri aŭ kvar minutoj, cetere
senpage.

Duan fojon

Elitaligis Cláudio R. Pistilli


tre
facila

Antaŭ multa tempo la edzino de kamparano mortis kaj
ŝia morto kaŭzis multan miron en la vilaĝo.

Dum ili portis per ĉaro* la mortan virinon al la tombejo,
la ĉevalo* vidis serpenton* sur la vojo. La ĉevalo ektemis
kaj saltis* malantaŭen. La ĉerko* falis surteren kaj la
morta virino reviviĝis.

Kiam ŝi mortis la duan fojon, la tuta kamparanaro
denove sekvis la veturilon kun la korpo* de la virino.

Kiam ili estis proksimaj al la tombejo*, la kamparano
diris al la ĉaristo: "Mi esperas, ke ĉi-foje ni ne trovos
serpenton sur la vojo."



Felipe Antero i. Lozano, 1994

- ĉaro:** veturilo, kiun movas bestoj
- ĉerko:** skatolo por sen-vivulo
- ĉevalo:** granda hejma besto, kiun homo uzas por veturi
- korpo:** la videbla parto de homo aŭ besto
- salti:** movo, per kiu oni rapide leviĝas de la tero kaj refalas
- serpento:** longa sen-pieda timiga besto
- tombejo:** *tomb*-ejo (tombo= truo en la tero por iu, kiu mortis)

ĉiu ajn ĉefe tial, ke ĝi prezentas
kernan temon vigle, distre kaj
sentabue.

La reĝisorino filmis ankaŭ la
filmadon mem de la intervjuoj,
tiel ke la publiko iel sentas sin
kamerao, samtempe demandan-
te sin mense pri la antaŭaj
demandoj. Krome ne eblas ne
senti diversgradan aktorecon en
la intervjuatoj: la fakto, ke iu
akceptas sidi kaj paroli antaŭ
kamerao, lampoj ktp dum pli ol
duonhora tutcerte iel modifas la
teniĝon de la respondanto.

La muntado de kohera filmo el
tiom da materialo certe ne estas
facila tasko, kaj la rezulto povin-

tus esti tute alia laŭ la kriterioj de
elekto kaj ordo. Chus Gutiérrez
sukcesis, laŭ mia opinio, krei ver-
kon interesan, pensigan kaj spritan.

Ne havus sencon transskribi ĉi
tie la diversajn dirojn. Mi tamen
atentigos pri la fakto, ke la reĝi-
sorino konscie ignoris la temon
aidoso. Laŭ ŝi aidoso estas mal-
sano, kaj la filmo temas ne pri
malsano, sed pri sekso. Mi tro-
vas ĉi tiun decidon aplaŭdinda,
ĉefe ĉar ofte papistoj kaj similuloj
emas prezenti kune sekson kaj
krimojn kiel kaŭzon de ĉiaj pro-
blemoj, manipule kaj hipokrite.

Georgo Kamaĉo, Hispanujo

Bellertaj Konkursoj (Rezulto)

Ni ĝojas anonci, ke la konkurson "Bellertaj Konkursoj" de *KONTAKTO* 141
(1994:3) partoprenis entute 32 homoj el 18 landoj, kio ja estas granda
sukseso! Lotume gajnis **Jehoŝua Tilleman** el Israelo. Gratulon al li!

Solvo			
1989	Zama Hoff	Poezio	<i>Drivu la flava vel'</i>
1990	Vara Gen	Teatraĵo	<i>La plenkreska graso</i>
1991	Bo Gi	Eseo	<i>Ho, mia pied'</i>
1992	Ivola Pena	Infanlibro	<i>La nepoj vin ĝenos</i>
1993	K. Loĉai	Prozo	<i>Tedu min sinjoro</i>

Klarigoj

Bo Gi ne povis verki *Tedu min sinjoro*, ĉar ĝi gajnis en 1993. Tio signifas, ke
povis verki ĝin nur K. Loĉai. Vara Gen evidente ne gajnis en 1989, ĉar tiam
gajnis poemo. La eseo *Ho, mia pied'* ne gajnis en 1989 pro la sama kialo. La
teatraĵo de Vara Gen ne povis ricevi premion en 1991, ĉar tiam gajnis Bo Gi.
La nepoj vin ĝenos ne povis gajni en 1991 pro la sama kialo. Bo Gi ne gajnis
en la branĉo "Poezio", ĉar tio okazis en 1989. Vara Gen ne verkis *Ho, mia
pied'*, ĉar tiu estas eseo, kaj ŝi verkis teatraĵon. *Tedu min sinjoro*, gajnita de
K. Loĉai, ne povas esti poemo, ĉar la poemo estis premiita en 1989, nek
teatraĵo, ĉar tiun premion gajnis Vara Gen, nek eseo, ĉar tiu nomiĝis *Ho, mia
pied'*, nek infanlibro (vidu indikon 5), do nepre devas esti prozaĵo. *La nepoj
vin ĝenos* estis verkita de Ivola Pena (indiko 3), do ne povas esti teatraĵo,
ĉar tiu estis verkita de Vara Gen. La sola eblo estas, ke ĝi estas infanlibro.
La plenkreska graso ne povas esti poemo (indiko 4), do nepre devas esti
teatraĵo. En tiu kazo, *Drivu la flava vel'* povas esti nur poemo. Ivola Pena ne
gajnis en la branĉo "Poezio", do la sola restanta eblo estas Zama Hoff. La
poemo ne povis titoliĝi *La nepoj vin ĝenos* (indiko 3), do la sola restanta eblo
estas *Drivu la flava vel'*. En tiu kazo, Bo Gi certe verkis la eseon *Ho, mia
pied'*. En 1989 gajnis la poemo, en 1991 gajnis la eseo verkita de Bo Gi, en
1993 gajnis la prozaĵo de K. Loĉai. En 1990 ne gajnis la infanlibro (indiko 5),
do nepre gajnis la teatraĵo verkita de Vara Gen, kaj en tiu kazo, Ivola Pena
gajnis en 1992.

"Ĉu vi parolas tendare?" estis origine verkita por
instrui Esperanton dum labortendaroj. Hodiaŭ,
kiam tiuj aranĝoj malpli furoras, tamen necesis...

...4-a eldono!

Ĉu vi parolas tendare?
Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rotterdamo: TEJO, 1992 (4-a eld.).
21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde
3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



La bona ingo

Laŭ ideo de nia leganto Jean Clet el Francio, ni komencos aperigi serion da ŝerebiloj pri sekura seksumado. La materialo venas el la tre simpata broŝureto *PASSEPORT*, eldonita de Infor Sida el Belgio. La desegnaĵoj estas verko de Fréd Guiot kaj P. Kroll.

Bedaŭrinde *KONTAKTO* ne povas donaci al vi kondomon, kiel faras la menciita broŝureto, sed ni povas almenaŭ bildigi pri ĝia korekta uzo. Memoru, ke ne sufiĉas havi kondomon en via poŝo – vi devas uzi (aŭ uzigi) ĝin!

Sube estas deziro en diversaj lingvoj. Se vi ne trovas la vian, jen:

BONAN FERIADON!

(kun kondomo, kompreneble!)

JEN KIEL AGI



• GOD FERIE • Bonnes Vacances • Καλές Διακοπές • Prettige Vakantie • Buone Vacanze • BOAS FÉRIAS •

• Happy Holidays • BUENAS VACACIONES • Schöne Ferien •



tentaklo

Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

Tro

Sendepende de tio, ĉu la faktoj prezentitaj en "Tro" (*KONTAKTO* 141, 1994:3) estas veraj (kion mi ne povas prijuĝi), la farita konkludo ŝajnas al mi nelogika. Ĉar la "troaj" homoj supozeble ne nur konsumis, sed ankaŭ produktis ion, kvankam la artikolo tiurilate restas iom nebula.

Kaj denove manko: En "La Ora Vojo" troviĝas steleto ĉe la vorto "bodisatvoj", sed neniu klarigo.

Reinhard Pflüger, Germanio
Red.: Kvankam sonas tute sciencfikcie, la artikolo pri la eksterstastistikuloj raportas pri realaĵo. La hispana ĵurnalo El País de la 21a/jul./94 (vd. bildon apude) raportas pri la temo. La loĝantaro de tiuj sekretaj urboj produktis ĉefe nuklean kaj militan varon, por kio nun, en tempoj de ŝparado, ne plu ekzistas mendoj. Neniu el tiuj

komunumoj, ekzemple, ricevis de la registaro la buĝetitan sumon por 1993 kaj 1994.

"Bodisatvo" estas PIV-a vorto kaj sekve ne devas esti glosita; ni forprenis ĝin de la vortareto, sed ni forgesis forigi la steleton!

Los jefes de ciudades secretas advierten del riesgo de otros 'Chernóbil' por la desidia del Gobierno

Viene de la primera página

"Cada submarino tiene dos reactores", señaló Steblin, que aludió al peligro de una repetición de Chernóbil y advirtió sobre las dificultades para formar tripulaciones completas, en vista de la fuga de los técnicos competentes por falta de condiciones de trabajo aceptables.

En conjunto, la flota militar rusa posee 62 submarinos atómicos con cohetes estratégicos a bordo, según datos oficiales de finales de 1993. El número total de submarinos atómicos es secreto. En una conversación con esta corresponsal, Steblin aclaró que, al construir los submarinos nucleares, que tienen una vida media de 20 a 30 años, no se presionó en detalles, que los submarinos pueden resistir los seis años que quedan de siglo. Estados Unidos ha ofrecido gratuitamente a Rusia tres equipos de instrumental para evaluar el caso el principal obstáculo estriba en las reticencias del Gobierno ruso a dar el dinero necesario, miles de millones de pesetas.



Ciudades dependientes del Ministerio de Energía Nuclear		Ciudades dependientes del Ministerio de Defensa		Dependientes del Comité de la Federación Rusa de la Industria Militar	
1. Arzamas-16	8. Tomsk-7	15. Belgoje-4	22. Tsiolnovo-5	35. Murnansk-50	
2. Penza-19	9. Sverdlovsk-45	16. Solmsno-2	23. Domódivsk-3	39. Chobit-esp-4	
3. Zlatóinsk-36	10. Sverdlovsk-44	17. Nov-Prátovsk-2	24. Penza-76	30. Chobit-46	
4. Chelobinsk-79		18. Nizh-Fominsk	25. Nizh-Fominsk-39	31. Shalóvsk-17	
5. Chelobinsk-65	11. Múrm	19. Stápano-7	26. Karsk-6	32. Svobódi-16	
6. Krasnoyarsk-26	12. Mármansk-130	20. Yart-2	27. Uru-4	33. Krasnoyarsk-15	
7. Krasnoyarsk-45	14. Mármansk-159				

Alispeca troo

Relegante mian recenzojn pri la filmo "La listo de Schindler" en *KONTAKTO* 140 (1994:2) mi konstatis, ke la vorto *degenerintan* iĝis *degeneritan*, sed mi komprenis tion tipa kompost-eraro kaj do ne emis protesti. Male, tre ĝenis min la dufoje miskorekto de la PIVa kaj zamenhofa *Nurenbergo* al la hispanisma *Nurembergo*. Ĉi-foje mi ja protestas, ĉar mi opinias tian ŝanĝon absurda, kaprica kaj arbitra.

Georgo Kamaĉo, Hispanujo
Red.: Ambaŭ ŝuldiĝas al mistajpo!

Ĉiam memorata Nasreddin Hoca

Mi gratulas la atingojn de nia kara revuo *KONTAKTO*. Dank' al ĝi, ekzemple, mi unufoje konstatis, ke en Turkio iam "vivis" iu komika elturniĝemulo, nome Nasreddin Hoca, kies ĝemelo Samandari, filo de Mandaranga, supozeble iam vivis en Burundio. Ĉe ni ŝovinistoj fiere kaj facilanime asertas, ke nur la runda lingvo posedas tiajn humuraĵojn.

Ndabinengesere Zacharie, Burundio

Ne troigu!


Ne necesas klarigo pri la mankoj en *KONTAKTO* 141 (1994:3). Mi ja rimarkis, ekzemple, la fuŝe presitan vortareton sub la teksto "La promeso", sed kiel tipa leganto, nur pensis, iom obtuze, "Hm, okazis ia miso tie." Aliajn erarojn mi tute ne rimarkis. Mi kredas, ke tiaj aferoj, kiuj ŝajnas katastrofaj al la redaktisto, estas apenaŭ rimarkataj de la normala leganto!

KONTAKTO ĉiam aspektas plaĉa kaj leginda. Mi esperas, ke vi longe restos kiel redaktisto.

Anna Löwenstein, Italio

Lidja

Heinz Dieter Maas, Germanio



Kvankam ne estas certe, kiam precize forpasis Lidja Zamenhof, la plej juna ido de la iniciatinto de Esperanto, kelkaj fontoj datas ĝin en 1944. La baha movado, por kiu Lidja enkorpiĝas la ligitecon inter la ideoj baha kaj internacilingva, memoras la 50-jariĝon de ŝia terura ekstermo en la nazia koncentrejo Treblinka.

En 1878 la 19-jara Ludoviko Zamenhof havis sian *Lingvo Universala* preta por uzo, kies naskiĝon li celebris kun siaj gimnaziaj samklasanoj per paroladoj kaj kantado de la himno de tiu nova lingvo:

Malamikete de la nacjes,
kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
konunigare so debá.

Tiuj linioj instruas al ni multon, ne nur pri la kreiĝo de Esperanto, sed precipe pri la idearo proklamita de ĝia aŭtoro. La tuta homaro devas unuiĝi en unu familio – jen la moto, kiu priskribas la celon, kiun Zamenhof donis al sia vivo. Ne la kreo de iu bela universala lingvo, taŭga por komerco kaj verkado, estis lia ĉefa celo, sed la disvastigo de la ideo pri homara interfratiĝo, Homaranismo, kiel li mem nomis sian idearon. Kaj, sen neŭtrala mondlingvo, la unueco de la homaro ne estus eĉ parte atingita.

En tia etoso naskiĝis kaj kreskis la zamenhofaj gefiloj, Adamo, Sofia kaj Lidja. Kiam Lidja naskiĝis en 1904, ŝiaj gefratoj jam estis preskaŭ plenkreskaj kaj la gepatroj ne plu junaj: la patrino havis aĝon de 40 jaroj kaj la patro 44. Kun la gefratoj ŝi ne povis multe interrilati, ĉar tiuj studis medicinon en Svislando, kaj ankaŭ poste ili ne ofte vidis unu la alian.

Ludoviko kaj lia edzino Klara vizitis ĉiun Universalan Kongreson kune, sed Lidja havis nenian emon lerni Esperanton. En 1909, kiam oni festis la 50-an naskiĝtagon de Zamenhof, multaj esperantistoj kunvenis kaj faris gratulajn paroladojn. Lidja, siatepe kvinjara knabineto, post ioma aŭskultado enĵetis: “Pri kio tiuj homoj parolaĉas? Mi komprenas eĉ ne unu vorton!” kaj proteste forlasis la feston. Oni havas fotojn de Lidja el tiu tempo, kiuj montras tre seriozan personeton kun vizaĝo esprimanta kvazaŭ sekretan, kaŝitan doloron. Ankaŭ kiel virino ŝi havis tiun seriozan mienon.

Ĉar la Universala Kongreso de 1913 okazos en Svislando, kie ŝiaj gefratoj vivas, oni atendis, ke la naŭjara Lidja kune kun la gepatroj vojaĝos tien. Grandega problemo tamen estis, ke Lidja obstine ne volis lerni Esperanton kaj komprenis nur kelkajn vortojn. Tiam la patrino klarigis al ŝi, ke ŝi devos resti hejme, se ŝi ne lernos la lingvon, kaj tio finfine efikis. En ses semajnoj Lidja lernis tiom, ke ŝi povis interkomunikiĝi en Esperanto.

Jam en tiu tempo multaj bahaanoj estis ankaŭ esperantistoj. Ĝis hodiaŭ estas konataj al bahaanoj la nomoj de Agnes Alexander, kiu vivis longan tempon en Japanujo, John Esslemont, kiu verkis fundamentan libron pri la Bahaa Kredo, *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*, Martha Root, kiu fariĝis intima amikino de Lidja. Tiam aperis la unuaj artikoloj pri la baha religio en Esperanto, tiel ke d-ro Zamenhof estis bone informita pri ĝi.

La sano de d-ro Zamenhof neniam estis stabila, li suferis pro kormalsano kaj mortis en la Unua Mondmilito, la 14-an de aprilo 1917, kiam Lidja estis nur 13-jara. Tiu-tempe ŝi perfekte regis Esperanton kaj faris unuajn provojn traduki el la pola lingvo en la Internacian. Ŝia kuzo Stephen raportis, ke ŝi ĉiam estis okupita pri tradukado kaj estis konvinkita, ke ŝi devos daŭrigi la laboron de la tro frue mortinta patro.

En 1921, en la aĝo de 17 jaroj, Lidja finis siajn gimnaziajn studojn kaj estis akceptita de la varsovia universitato kiel studento de juro. Kaj tri jarojn poste, en 1924, ŝi unuafoje publike enpaŝis en Universala Kongreso, okaze de kunsido de la Akademio kaj la Lingva Komitato.

En 1925 Lidja Zamenhof finis siajn studojn kaj ekhavis la akademian gradon de magistro pri juro. Tio tamen ne kondukis aŭtomate al iu profesio, des pli ĉar Lidja estis judo, por kiu ŝtata ofico estis praktike neatingebla. Aliflanke, ŝi ne interesiĝis pri dom-mastrado kaj neniam sentis emon al edziniĝo. Eĉ kuiri ŝi neniam lernis. Por ŝi estis klare, ke ŝi iel dediĉos sian vivon al la idealoj zamenhofaj. Esperantujo estis ŝia hejmo.

Dum la Ĝeneva Universala Kongreso en 1925 okazis fakkunveno de la bahaaj esperantistoj, al kiu Lidja estis invitita. Ŝi tute ne deziris tien iri, sed fine pro ĝentileco ŝi tamen partoprenis. Tie ŝi konatiĝis kun Adelbert Mühlshlegel kaj Martha Root, famaj bahaanoj. Ankaŭ la fratino de Lidja, Sofia, partoprenis la aranĝon, dum kiu ŝi legis artikolon de sia patro pri la neceso de universala religio.

La sekvan jaron, 1926, oni finfine inaŭguris la Zamenhof-monumenton en Varsovio. Martha Root oficiale reprezentis la bahaan religion kaj parolis pri “La Bahaa Movado kiel formo de homaranismo”. Ŝi restis du semajnoj en Varsovio kaj dormis kun Lidja en sama ĉambro. Ili fariĝis bonaj amikinoj, kvankam Lidja neniel volis akcepti la religiajn konvinkojn de Martha, des malpli, ĉar ŝi konsideris sin ateisto. Tamen, iom post iom Lidja konvinkiĝis pri la kredo kaj akceptis ĝin.

En 1926 Lidja partoprenis la bahaan kunvenon okaze de la Edinburga UK kun siaj gefratoj. Al tiu kunveno la fame konata sciencisto Auguste Forel, kies portreton hodiaŭ montras la mil-frankaj svisaj monbiletoj, sendis saluttelegramon: “Longe vivu la universala religio de Bahá'u'lláh! Longe vivu la Internacia Lingvo Esperanto!”. Estas interese, ke el korepondado inter Forel kaj Abdu'l-Bahá, filo de la fondinto de bahaismo, rezultis verko nuntempe konata de ĉiu bahaano: *Letero al Forel*.

En tiu tempo Lidja komencis instrui Esperanton en Varsovio kaj verki artikolojn por *Pola Esperantisto*, per kio ŝi perlaboris iom da mono.

(Fino en nia venonta numero)